Mozilla File Edit View Go Bookmarks Tools Window Help dl. 12:10 Lluís de Yzaguirre i Maura

Navegació pel Corpus EO – Mozilla

Back Forward Reload Stop http://127.0.0.1/eo/eokorpus.html Search Print

Home Bookmarks Google LdYM UPF RETOC LIC Scrabble Bàsquet rsrc info

Navegació pel Corpus EO | http://127.0.0...../eokorpus.cgi | Deutsche Baha'i-Gemeinde

profet

| Reg | ID | IDSERV | IDURL | CODIF | NUMGRAM | NUMLEX | CL |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | 6 | 5 | 5 | 1 | 5 | 5 | 100 |
| 5 | 000005 | www.bahai.de | /bahaaeligo/U-tekstoj/historio2-U.htm | 8 | 390 | 332 | religi;profet;komun;reven;sun;konsider;fac;teolog |
| 42 | 000042 | www.volny.cz | /malovec/tenebr3.htm | 8 | 108 | 88 | profet;tromp;jar;printemp;trov |

Registre: 0 Filtre: ?

Mon Sep 6 12:09:16 2004
/Library/WebServer/Documents/eo/pagines / tenim 563 registres

Obrim /Users/shared/perl/eo/html/postGoogle/EK000042.html

MALBONAŬGURA PACO

Pasis preskaŭ dudek jaroj de la tago, kiam Komenio kun siaj kunuloj forlasis la patrujon. Nekonata pastro fariĝis kreinto de admirata instrumetodo, preparanto de nova filozofio, viro estimata de la sciencistoj kaj politikistoj. Sed kio estis ĉio ĉi kompare kun la ŝanco, ŝanco malfermiĝanta, kiam finfine estingiĝadis la flamoj de la milito, kaj la elsangintaj landoj vokis pri justa paco. La nostalgio pri la patrujo ne forlasis la ekzilitojn. Multaj ekzilitoj jam mortis, sed ilia lasta elspiro estis la vorto espero. La gepatroj per ĝi vivnutris siajn adoleskantajn gefilojn. Iliaj filoj fordonadis por ĝi siajn vivojn en fremdaj regimentoj. Kaj nun fine la milita supereco decide klinis sin al la flanko de Svedio kaj Francio. Generaloj Banner, Torstenson kaj Wrangel venkadis la imperiestrajn, kaj la svedaj kaskoj jam brilis super la piedpremitaj kampoj de Bohemio kaj Moravio. La ekzilitoj kortuŝite ripetis la vortojn de Oxenstierna, ke la evangelia noj ne estos plu en la eŭropaj landoj nur tolerataj, sed ke ili devas fariĝi iliaj plenrajtaj civitanoj. Ĉiuj sekvis la traktadon pri la paco en Mu"nster kaj Osnabru"ck kun angora atento. Ĉu fine oni redonos la liberecon al la ĉeĥaj landoj?

Ĝojaj mesaĝj anoncis, ke la generalo Koenigsmark jam ekstaris antaŭ Prago kaj konkeris la Kastelon; alia sveda armeo staris en la sudo de Bohemio.

Sed informoj pri la pactraktadoj forbruligis la esperojn kiel kruela frosto tro fruajn florojn. Ta°bor, pri kies forto la ĉeĥoj esperis, malrapide disfaladis. La holandanojn ne plu minacis la hispana superforto. Francio okupiĝis pri siaj internaj konfliktoj. La germanaj protestantoj interesiĝis nur pri la propraj avantaĝoj. Kristina, malpacience sopiranta la regadon sen kuratorado de la kanceliero, insistis pri paca interkonsento, ĝi kostu kiom ajn, kaj Oxenstierna perdadis la influon; cetere lia interesiĝo pri la laboro de Komenio kaj pri la sorto de la ĉ eĥaj elmigrintoj estingiĝis. La katolika partio ekvidis sian ŝancon, cedis de la religia linio kaj limiĝis je politikaj traktadoj. Tio permesis al la senditoj de imperiestro Ferdinando III, kiu sekvis spurojn de sia patro, resti surdaj al mencioj pri la ĉeĥaj landoj. Ĉiam pli akre konturiĝis terura eventualo, ke la politika situacio similos al la jaro 1624, al la situacio post la batalo sur la Blanka monteto, kaj per tio la sorto de la ĉeĥoj estus forsigelita.

http://127.0.0.1/cgi-bin/eokorpus.cgi?localDoc=42